

Heinrich Heine,  
Vi estas tiel bela

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Vi estas tiel bela  
samkiel ĉarma flor’;  
vidante vin, doloron  
mi sentas en la kor’.

Surmeti la manojn sur vian  
kapeton inklinas mi,  
preĝante, ke ĉarma kaj bela  
konservu vin ĉiam Di’.

*Traduko de la Germana poemo “Du bist wie eine Blume” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2001-09-20.*

*MR-365-1 / Arg-475-917 (2008-07-15 12:10:51)*

Heinrich Heine,  
Vi estas al mi kiel floro

*tradukita de Hein Wernik*

Vi esta al mi kiel floro  
Pro puro kaj bel’ kaj graci’,  
Mi vidas vin, kaj en la koron  
Kaŝiras la melankoli’.

Mi volus sur vin preĝe meti  
La manojn, floranta juvel’;  
Ke gardu vin Dio pro via  
Gracio kaj puro kaj bel’.

*Traduko de la Germana poemo “Du bist wie eine Blume” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Hein Wernik en 1994.*

*Arg-475-918 (2010-05-26 19:16:04)*

*La adreso de s-ro Hein Wernik estas: Prinsenlaan 26, NL-6542 TB Nijmegen, Nederlando.*